

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago, № 1 (16), Januaro 2006

**Adreso (provizora):**  
**Esperanto Societo de Ŝikago**  
**p/a Viktor' Pajuk**  
**8228 O'Connor Dr., # 2F**  
**River Grove, IL 60171**  
**(773) 344-2276**  
**www.esperanto-chicago.org/**

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – Puramo Chong  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak  
Kasisto – Karlo Gunn

## Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;  
Familio \$30; Regula \$20;  
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.

**Dues** are needed for the routine expenses of our Society.

Check should be payable to:

**The Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our **Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607**

## Kunvenoj:

Membroj de la Ŝikaga Esperanto Societo kunsidas ĉiun kvaran merkredon de monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chikago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

## Bonvenon!

Kara leganto, jam komenciĝas tria jaro de mia agado sur la redakta posteno de nia societa bulteno, mi provis iom fantazii kaj plibonigi ĝeneralan aspekton de la periodaĵo, sed evidentiĝis, ke nur deziro ne sufiĉas, devas esti ankaŭ lerto kaj sperto (la lastaj du mankas). Se estas dezirantoj kaj spertuloj helpi – ne hezitu kontakti min. Kaj nun mi transdonas vorton al nia prezidanto.

Estimataj ESdŜ-membroj! Sanon kaj feliĉon al vi kaj viaj familianoj en la 2006 jaro, sukcesojn sur la verda tereno (kaj ne nur), realigon de viaj E-revoj kaj volon plibonigi staton de E-movado en la fama Venta Urbo. Kvankam en la pasinta jaro aliĝis al la Societo kelkaj spertaj kaj renomaj (en aliaj landoj) e-istoj, staras antaŭ ni la ĉefa tasko – plijuniĝo, mankas al ni junaj personoj, kapablaj estonte porti, alte tenante, la verdan standardon. Kiel solvi ĉi problemon ni devas decidi kune, ja la sukcesoj de Interreto donas al ni perfektan propagandilon kaj instruilon, ni devas nur lerte ekuzi ĝin. En ĝi mi vidas eblecon plijunigi nian E-familion kaj ni uzu la ŝancon. Do, ek!

Viktor Pajuk

## Zamenhofa Bankedo

Antaŭ unu monato en gastema korea restoracio *Solga*, dank'al streboj de d-ro P. Chong, okazis nia tradicia Zamenhofa bankedo. Ĉi foje partoprenis gesamideanoj el tri najbaraj ŝtatoj – Ilinojo, Viskonsino kaj Indiano, kvankam ni atendis homojn ankaŭ el Miŝigano kaj Kentukio. Pri la bonetoso de la aranĝo atestas la suba foto.



## Laste aperis

Sur la vastaj paĝoj de la bulteno ni jam rakontis pri la libro, kiu furoris dum la lasta UK en litova Vilno. Jes, vi pravas, temas pri *Zamenhof-Strato* de Roman Dobrzynski. La aŭtoro (evidentiĝis) estas lega(o)nto de *Saluton!* kaj eĉ sendis al ni interesan informon pri la libro. Post japa-

## UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

Esperanto.Net –

Home of a comprehensive FAQ list  
[http://www.esperanto.net/info/index\\_en.html](http://www.esperanto.net/info/index_en.html)

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;  
toll free: 1-800-ESPERANTO  
(1-800-377-3726)  
<http://www.esperanto-usa.org/>

UEA – The Universal Esperanto Association  
<http://www.uea.org>

Free Esperanto Course on Internet  
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course  
<http://www.mintex.demon.co.uk/espvi/angla/index.htm>

Esperantic Studies Foundation  
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo  
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format  
<http://osiek.org/aera/en.html>

Pola Radio en Esperanto:  
<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

na, litova, pola kaj ĉeĥa tradukoj en Zagrebo estis prezentita kroata versio de la libro kaj oni anoncis pri apero de slovena kaj slovaka. Krome, por blinduloj oni surbendigis E-tekston, estas preta portugala traduko, ankaŭ – latva kaj estona, rusa kaj hungara serĉas eldonistojn, baldaŭ oni starigos fin-punkton en versioj itala, ukraina, nederlanda, franca k germana. Mankas nur sperta tradukisto por angligo.

Kaj ege proksime aperis la nova libro de nia samklubano s-ro Gregoro Dolgin – “Synthesis of Harmony”. Spite la angla titolo, la libro enhavas poemojn en E-o, rusa, angla kaj ankoraŭ kelkaj lingvoj kun muziknotoj. Kelkaj kantoj sukcesis dum la UK en Vilno kaj ni havis eblecon aŭskulti ilin dum la Zamenhofa bankedo. Jen estas interesa poemo pri la forto de poezio:

Tavoloj de homara histori’ –  
Science povas ilin prikalkuli,  
Sed ne ciferoj – arta fantazi’  
Pasinton ĉiam pretas respuguli  
Per sorĉa Poezi’.

Tavoloj de homara histori’ –  
Estonton montri, certe, povas Dio  
Kaj pastro dum predik’ en eklezi’,  
Sed realigas tion sunradio  
De alta Poezi’!

Tavoloj de homara histori’  
Kaj nia temp’ malvirta inter ili –  
Animon liberigi de vizi’,  
De fer-katenoj ege malfacile –  
Sed povas Poezi’!

Ĉu plaĉas al vi? Se jes, turnu vin al s-ro G. Dolgin, kiu serĉas monsubtenantoj por realigi kant-projekton dum la ĉi-jara UK en Italio. Lia ret-adreso: [dolgin@dls.net](mailto:dolgin@dls.net)

## Sekvantaj kunsidoj:

**25an de Januaro** – nia vic-prezidanto **d-ro Puramo Chong** raportos pri la laboro de INA en Ŝanhajo

**22an de Februaro** – temo estos anoncata aldone, prelegontoj estas serĉataj

**22an de Marto** – XX datrevenon de Ĉornobila katastrofo en Ukrainio

**26an de Aprilo** – vizito de fama rusa E-poeto k kantisto Mikaelo Bruna Ŝtono

**24an de Majo** – tro longe atendi

## Utila informo


**Do You want to practice Your Esperanto by phone? Mr. Byron Eiguren will help You to achieve fluency in IL conversation. Call him: (847) 446-6764. He’s a linguist and speaks several languages, including English and Spanish.**

Ni ricevis kelkajn oficialajn informojn de Itala E-Federacio:

1. UK, Florenco, 29.07-05.08.2006. La fama kantisto Andrea Bocelli akceptis inviton eniri Honoran Komitaton.
2. Internacia Infana Kongreseto, Prato, 29.07-05.08.2006.
3. ILEI-konferenco, Parma, 25-29.07.2006: kolegeca etoso, moderkosta loĝado, agrablaj vesperoj k tuttaga ekskurso.
4. Olimpikaj ludoj (por E-parolantoj), Torino, 10-26.02.2006

Por pluraj informoj de IEF: <http://www.ukflorenco2006.it/>

Estu sanaj kaj feliĉaj en ĉi maltrankvila mondo!

 araneoesp @ yahoo.co.uk